



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 3-an de Julio 2023

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Inbar Mor, Amri Wandel. **Zome:** Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi. **Gastoj** (parte): Amir Naor, Viktor Glejzerov, Asta.

La Estrar-kunsido okazis tuj post la jara Landa Kunveno.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

Amri: en la interreta gazeto *JNS – Jewish News Stndicate* aperis la 22-an de Junio (lige al la 108-a UK en Torino) bela artikolo kun fotoj pri Esperanto. Ĝi estas legebla ĉe <https://www.jns.org/world-news/italy/23/6/22/297266/>.

2. Magazeno por la libroj de ELI – urĝeco (Jehoŝua, Ŝlomo)

Jehoŝua: la frato de **Jinon Meiri** petis, ke ni forigu ties librojn. **Doron Modan** akceptos ilin, provizore (kontraŭ dumviva membreco de ELI – laŭ mia propono). **Gabi:** lastatempe mi vidis informojn pri pli kaj pli popularaj luigeblaj magazinaj solvoj. Mi sendos la detalojn pri ili al **Ŝlomo**, kopie al **Jehoŝua**.

3. *Israela Esperantisto* (Mikaelo, Amri)

Mikaelo: La unua parto estas preta. Mi lasis du malplenajn paĝojn por la nekrologoj. **Amri:** la malantaŭa kovrilo estu mozaiko de bildoj pri nia lasta IK. **Gabi:** mi sendos tri artikolojn, kiuj estas pretaj por la bulteno – al la retejo; **Dror** publikigu ilin.

4. *La Somerfina Renkontiĝo* (Jehoŝua)

Ĝi okazos en la koŝera restoracio *Piazza Grande* en la kvartalo *Sarona* (jam la trian jaron!) la 28-an de Aŭgusto inter 18h00-20h00.

5. *La venonta Israela Kongreso* (Jehoŝua)

Jehoŝua komencos esplori. Ĉu Jeruĥam? **Inbar:** ne estas kion fari tie. **Amri:** Ĉu Jerusalemo? Micpe Ramon? **Jehoŝua:** ni jam estis en tiuj. **Amri:** post Shptembro la hoteloj jam komencos pleniĝi!

La venonta kunsido: lunde, la 4-an de Septembro 2023, je la 20:00

Protokolis: Gabi Zeevi